

Dum izolado, 26/04/2020

Luko 24:13-35

Karaj gefratoj,

Vi certe ĉiuj konas ĉi tiun rakonton, pri tiuj du disĉiploj kiuj post la krucigo de Jesuo reiris al sia hejmo. Mi volas atentigi vin, ke plej verŝajne, male al la tradicia interpreto, ne temas pri du viroj sed pri geedza paro, kiu akceptis Jesuon en sia domo, en sia hejmo.

Ĉu, ni en tiu ĉi speciala periodo, kiun ni vivas, ni invitas Jesuon en nian domon, nian hejmon ? Ĉu estas por li loko ?

Por resumi, tiu paro revenas hejmen diskutante dum la vojo. Iu alvenas kaj kunvojaĝas kaj kundiskutas. Ili firme invitas lin resti ĉe ili. Dum la manĝo ili rekonas Jesuon kiu tuj malaperas. Ili tiam reiras al la urbo por raporti al la aliaj disĉiploj kion ili spertis.

En tiu teksto pluraj aspektoj aperas, kiujn mi prezentos : diskuto kaj parolo, okuloj kaj vidado, vojaĝo kaj vojo, la greka vorto egeneto, la relevigo.

En ĉi tiu peco, oni multe parolas. Interese estas, ke en ĝi oni trovas la radikojn de la tri etapojn de la Bibliaj studado kaj meditado : ekzegezo, hermeneŭtiko kaj homiletiko. La du disĉiploj ĉi tie trapasis ĉiujn.

En versikloj 14 kaj 15, nia traduko indikas ke ili interparolis. La vorto signifas ĉefe komercajn rilatojn, sed ankaŭ interparolojn. La nuna senco venas tra la latina kaj signifas priparoladon. En versiklo 27 Jesuo klarigis la Skribojn, t.e. interpretis ilin.

En versiklo 35, la disĉiploj rakontas, t.e. klarigas, prezentas la okazintaĵojn.

Plie, la dua verbo de la versiklo 15 signifas pli ol simpla diskuto, oni povus diri disputis, interŝanĝis argumentojn.

Niaj disĉiploj, unue inter si kaj poste kun Jesuo parolis, interparolis, aŭskultis la parolojn de Jesuo kiu klarigis al ili la Skribojn.

Tio, traserĉado kaj klarigo kaj interpreto de la Skriboj estas unu el la ĉefaj taskoj de la Eklezio, kaj ankaŭ de ĉiu kristano.

Tamen, la efiko de tio ne dependas de la Eklezio, de la kristanoj mem, sed de Dio, de la Spirito. La teksto diras ke la okuloj de la disĉiploj estis malhelpataj vidi, t.e. ankaŭ kompreni. Kiam li ne komprenas, blindulo diras kiel la vidantoj : "mi ne vidas".

La fino de la teksto indikas ke post la dispecigo de la pano, iliaj okuloj malfermiĝis. Tiam, ili komprenis ke Jesuo dum la vojo malfermis al ili la skribojn, kiel diras la versiklo 32. La esperanta versio diras "klarigis" sed la originalo estas "malfermis".

Por koni, rekoni la Sinjoron, oni bezonas malfermitajn okulojn, malfermitan menson.

La menso de la du estis fermita. Ili ne eltrovis en la disputado inter si. Eĉ, reage al la demando de la kunvojaĝanto, ili haltis. Ili ne povis eliri el siaj blokadoj, el siaj unuaj esperoj, el siaj komprenoj. Ili rigardis al la malĝusta loko. Tial, Jesuo diris al ili ke ili estas malsaĝuloj kaj kore malvigluloj.

Tiu kiu restas staranta je sia propra pensosistemo ne povas akcepti ion el aliloke kaj rondiras nenien.

La teksto tamen pli taĝus por kino ol por foto. Ili preskaŭ ĉiam moviĝas. La du vojaĝas hejmen el Jerusalemo. Jesuo kunvojaĝas. Alveninte, Jesuo planis plui. Tuj post la malapero de Jesuo, ili reiris al la urbo. La parolo de Dio aŭdiĝas dumvoje, dumvojaĝe, dum movo. Kutima diro estas : kiu ne antaŭeniras malantaŭeniras. Kiu ne iras el sia komforto, el sia loko, iras nenien. Oni povas kompreni la Vorton de Dio nur moviĝante, sur la vojo.

Mi ĵus diris, ke oni bezonas aliecon, alian voĉon, malfermiĝi, malfermiĝi al la Skriboj, malfermiĝi al la Spirito, al la parolo de Jesuo.

Kvarfoje en tiu teksto troviĝas la greka vorto egeneto. Nia esperanta versio ne redonis tion. Ĉiufoje, tiu vorto rilatas al Jesuo. Ĝi signifas ion kiel "okazis".

Okazis, ke kiam ili interdiskutis Jesuo alproksimiĝis.

Okazis en Jerusalemo ĉi tiuj aferoj pri Jesuo, ke li mortis.

Okazis ĉe la tablo ke li prenis panon.

Okazis ke li fariĝis nevidebla.

Jesuo intervenis en ilia vivo. Ili parolis pri Jesuo, kaj okazis ke li estis tie.

Okazis ke la potenca profeto kiu mortis komentis al ili Moseon kaj la profetojn

Ili aŭdis la klarigon de la Skriboj, kaj okazis ke li dispecigis la panon post la beno.

Okazis, ke kiam ne plu estis utila la vido li malaperis, li fariĝis nevidebla.

Kiam unu aŭ du estas kune, Li estas inter ili.

Kio okazis al tiuj du disĉiploj ne estas nur la malfermiĝo de la okuloj kaj de la fido, sed ilia releviĝo.

Kiam la teksto parolas pri Jesuo, ĝi diras le li estas vivanta, ke li vekigis. Sed pri la disĉiploj, en versiklo 33, la teksto diras ke ili levigis, relevigis.

Multaj inter ni estas dum tiu ĉi tempo blokataj en la domo. Vojaĝo fizika ne plu eblas. Sed tio ne malpermesas al ni vojaĝi kun Jesuo laŭ la Skriboj, studante ilin, aŭskultante ilin.

Kiam eblos, ni povos levigi, kaj iri por atesti pri lia ĉeesto, pri lia kunesto, pri lia akompano en restado kaj en movo.

Amen.